# Leciono 3



Co-funded by the
Erasmus+ Programme
of the European Union

Tiu ĉi projekto estas financata per subteno de Eŭropa Komisiono. Tiu ĉi publikaĵo respegulas nur vidpunkton de la aŭtoro, pro tio la Komisiono ne povas esti respondeca pri ajna uzado de informoj, kiuj aperas ĉi tie.

https://lernu.net/instruado?lang=eo

BY NC ND

La tuta enhavo, se ne estas indikite ie eksplicite io alia, apartenas al *lernu.net* kaj estas publikigita sub la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Nekomerce-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda.

# Gramatiko

lernu!

## Adverboj

La adverboj (vortoj kiuj priskribas verbojn) formiĝas per aldono de la finaĵo -e:

| | | |
|---|---|---|
| bele | = | bele |
| forte | = | forte |
| Rapida aŭto veturas rapide. | = | Rapida aŭto veturas rapide. |

## per

La prepozicio per indikas ilon per kiu io estas farata:

| | | |
|---|---|---|
| per | = | per |
| Manĝi per kulero. | = | Manĝi per kulero. |
| Ŝi kantis per tre bela voĉo. | = | Ŝi kantis per tre bela voĉo. |

## kun

La prepozicio kun indikas ke oni estas en societo kun iu aŭ faras ion kun iu alia:

| | | |
|---|---|---|
| kun | = | kun |
| Mi iris kun la amiko. | = | Mi iris kun la amiko. |
| Mi parolos kun li. | = | Mi parolos kun li. |

## post

La prepozicio post indikas la tempan aŭ lokan agon okazantan post iu pli frua aŭ antaŭa ago:

| | | |
|---|---|---|
| post | = | post |
| poste | = | poste |
| Li venis post mi. | = | Li venis post mi. |
| Mi iras post vi. | = | Mi iras post vi. |
| Mi venos post tri horoj. | = | Mi venos post tri horoj. |

## malantaŭ

| | | |
|---|---|---|
| malantaŭ | = | malantaŭ |
| Li venis malantaŭ mi. | = | Li venis malantaŭ mi. |

**-ul-**

La sufikso -ul- indikas personon havantan iun kvaliton, distingon:

| | | |
|---|---|---|
| grandulo | = | grandulo |
| malbonulo | = | malbonulo |
| belulino | = | belulino |

**-ej-**

La sufikso -ej- indikas spacon (lokon):

| | | |
|---|---|---|
| lernejo | = | lernejo |
| kuirejo | = | kuirejo |
| laborejo | = | laborejo |

**-ebl-**

La sufikso -ebl- indikas eblecon esprimitan per radiko:

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| manĝebla | = | manĝebla | eble | = | eble |
| videbla | = | videbla | malebla | = | malebla |
| kompreneble | = | kompreneble | | | |

**Volitivo (imperativo): U-finaĵo**

Imperativo en Esperanto formiĝas per la finaĵo -u.

| | | |
|---|---|---|
| Manĝu! | = | Manĝu! |
| Iru! | = | Iru! |

Apud imperativo povas stari ankaŭ subjekto:

| | | |
|---|---|---|
| Li lernu! | = | Li lernu! |
| Ni vidu. | = | Ni vidu. |

Ĉe volitivo oni tre ofte forlasas la subjekton, se ĝi estas la pronomo vi: Venu tuj! = **Vi** venu tuj! Sed tia forlaso eblas nur en ĉeffrazo, ne en subfrazo.

# Bloko 11 (sesioj 21-22)

## Lernoceloj

- ekkoni la adverban finaĵon -E
- ekkoni la imperativan finaĵon -U
- ripeti la uzadon de la pasinta kaj estonta tempoj (finaĵoj-IS kaj -OS)

## Bezonataj instruiloj

- komputilo por ludi sonon

## Pretigado

- Sonoj **1, 2**
- Kopioj de **M1**
- Kopioj de **M2**
- Kopioj de **M3**
- Kopioj de **M4**
- Kopioj de **M5**
- Kopioj de **M6**

## Novaj vortoj

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| longe | = | longe | poste | = | poste | varma | = | varma |
| sufiĉe | = | sufiĉe | riĉa | = | riĉa | -EJ | = | -EJ |
| paroli | = | paroli | ĝoje | = | ĝoje | tago | = | tago |
| mono | = | mono | afero | = | afero | -E | = | -E |
| antaŭ | = | antaŭ | tra | = | tra | kafo | = | kafo |
| kompreni | = | kompreni | aŭ | = | aŭ | kiel | = | kiel |
| post | = | post | strato | = | strato | kuko | = | kuko |
| dolaro | = | dolaro | kanti | = | kanti | -U | = | -U |


# Lernplano

| | |
|---|---|
| 20 min | Disdonu la tekston **M1** kaj aŭskultu la sonon **1**.<br>Legu kaj traduku ĝin kune. Petu lernantojn legi po 2 frazoj kaj traduki ilin denove. Kiam ili atingas finon de la teksto, ili rekomencas sed ĉi-foje sen traduko. La instruisto helpas nur kun ĝusta elparolo kaj, se necese, kun tradukado.<br>Atentigu pri la gramatikaĵoj en la leciono: la finaĵo -E kaj la sufiksoj -EJ-, -EBL-. |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 10 min | Unue klarigu la novajn gramatikaĵojn. La finaĵo-E indikas adverbon. Adverbo priskribas verbon dum adjektivo priskribas substantivon. Priskribu la uzon de la finaĵo -U por imperativo kaj donu kelkajn ekzemplojn por ripeti la pasintan (-IS) kaj estontan (-OS) tempojn. |
| 10 min | Disdonu la dialogon **M2** kaj la ekzercon **M3**. Laŭtlegu la dialogojn al la lernantoj. Ili sekvu la dialogon kaj numeru la miksitajn frazojn en la ĝusta ordo.<br>Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin. Petu unu duopon laŭtlegi la dialogon kaj traduki ĝin linion post linio. Helpu ilin kun tradukado, se necese. Poste petu tiun duopon ludi la dialogon sen traduki ĝin denove. Se estas tempo, vi povas peti aliajn duopojn ludi la dialogon. |
| 10 min | |
| 20 min | La lernantoj legu la Dialogon **M2** ankoraŭfoje. Poste ili lasu flanke la dialogojn kaj kompletigu**M4** sen rigardi la dialogon. Ilia tasko estas plenigi la truojn per la mankantaj vortoj. |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 10 min | Laboru kun la tuta klaso aŭ dividu la lernantojn en grupojn. La lernantoj traduku la frazojn el**M5** al sia lingvo. |
| | Donu hejmtaskojn |

## M1 Teksto

**En kafejo (1-a parto)**

Ana kaj Marko longe parolis antaŭ la lernejo. Poste ili ĝoje iris tra la strato. Estis varma tago. Ili vidis kafejon kaj en ĝi kukojn.



– Ni eniru kaj manĝu – diris Marko.

– Ĉu vi havas sufiĉan monon?

– Kompreneble, mi havas cent dolarojn.

– Ho, vi estas riĉa!

## M2 Dialogo

**Julia** Petro, kiel mi kantas?

**Petro** Bele sed forte. Ĉu vi povas malforte?

**Julia** Mi komprenas. Eble mi povos.

**Petro** Ĉu vi ŝatas kukojn kaj kafon?

**Julia** Ho, jes.

**Petro** Venu kun mi al kafejo. Ni sidos kaj parolos pri geamikoj. Mi havas monon por la kukoj kaj kafo. La kafo por mi devas esti varma.



## M3 Ekzerco

Aŭskultu kaj numerigu.

| | |
|---|---|
| | Petro: Ĉu vi ŝatas kukojn kaj kafon? |
| | Julia: Mi komprenas. Eble mi povos. |
| | Julia: Petro, kiel mi kantas? |
| | Petro: Bele sed forte. Ĉu vi povas malforte? |
| | Julia: Ho, jes. |
| | Petro: Venu kun mi al kafejo. Ni sidos kaj parolos pri geamikoj. Mi havas monon por la kukoj kaj kafo. La kafo por mi devas esti varma. |

## M4 Ekzerco

Plenigu la truojn.

Julia: Petro, kiel mi ____________________?

Petro: ____________________ sed forte. Ĉu vi povas ____________________?

Julia: Mi komprenas. Eble mi povos.

Petro: Ĉu vi ŝatas ____________________ kaj kafon?

Julia: Ho, jes.

Petro: Venu kun mi al ____________________. Ni sidos kaj parolos pri geamikoj. Mi havas ____________________ por la kukoj kaj kafo. La kafo por mi ____________________ esti varma.

## M5 Tradukekzerco

Traduku al via lingvo.

Mi ŝatas kanti belajn kantojn. Mi lernas multe matematikon, sed ne scias sufiĉe. Ili venis rapide al la lernejo kaj devis lerni longe. Sur la strato mi iris rapide kaj ne parolis multe. Venu rapide al mia hejmo kaj vi povos ĝoje paroli kun mi.

# M6 Kanto

**Ne mono sed amo**

Ho, kion vi faras? demandas nun Marko.

Mi legas la libron, mi lernas la lingvon.

Ĉu kun mi vi venos al kafo amika?

Vi trinkos la kafon, parolos kun mi.

Mi dankas, ho Marko, mi ŝatas la kafon,

se ĝi estas bona, se ĝi estas varma.

Mi tre ŝatas sidi kun vi en la ĉambro,

sed nun mi ne povas, mi diras al vi.

Melodio: esperantofre.com

## M7 Hejmtasko

Skribu vian propran dialogon.

Lernu ĉiujn novajn vortojn ĝis la sekva leciono.

# Bloko 12 (sesioj 23-24)

## Lernoceloj

- ekzerci gramatikon el la leciono **3**
- lerni novajn vortojn

## Bezonataj instruiloj

- komputilo por ludi sonon

## Pretigado

- Sonoj **3, 4, 5**
- Kopioj de **M8**
- Kopioj de **M9**
- Kopioj de **M10**
- Kopioj de **M11**

## Novaj vortoj

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| kelnero | = | kelnero | unu | = | unu | apetito | = | apetito |
| -EBL | = | -EBL | loko | = | loko | voĉo | = | voĉo |
| porti | = | porti | rapida | = | rapida | gimnazio | = | gimnazio |
| -UL | = | -UL | alia | = | alia | okazi | = | okazi |
| multaj | = | multaj | dormi | = | dormi | saluton | = | saluton |
| per | = | per | vizaĝo | = | vizaĝo | scii | = | scii |
| denove | = | denove | vojaĝi | = | vojaĝi | restoracio | = | restoracio |
| kie | = | kie | fine | = | fine | cent | = | cent |
| serĉi | = | serĉi | banano | = | banano | | | |
| sen | = | sen | forta | = | forta | | | |

## Lernplano

| | |
|---|---|
| 5 min | Kantu kune la kanton **M6**. |
| 15 min | Disdonu la tekston **M8** kaj aŭskultu la sonon **3**.<br>Legu kaj traduku ĝin kune. Petu lernantojn legi po 2 frazoj kaj traduki ilin denove. Kiam ili atingas finon de la teksto, ili rekomencas sed ĉi-foje sen traduko. La instruisto helpas nur kun ĝusta elparolo kaj, se necese, kun tradukado. |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 10 min | Paŭzo |
| 10 min | Disdonu la ekzercon **M9**. La lernantoj legu la frazojn pri la teksto kaj decidu, ĉu ili estas veraj aŭ ne. |
| 5 min | Kantu kune la kanton **M6**. |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 20 min | Disdonu la ekzercon **M10**. Poste laŭtlegu la dialogon **M11**. La lernantoj sekvu la tekston kaj plenigu la mankantajn vortojn en **M10**.<br>Disdonu la dialogon **M11**.<br>Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin. Petu unu duopon laŭtlegi la dialogon kaj traduki ĝin linion post linio. Helpu ilin kun tradukado, se necese. Poste petu tiun duopon ludi la dialogon sen traduki ĝin denove. Se estas tempo, vi povas peti aliajn duopojn ludi la dialogon. |
| | Donu hejmtaskojn |

**En kafejo (2-a parto)**

La kelnero alportis multajn kukojn. Ili manĝis kaj post la manĝo la kelnero denove venis.

Marko serĉis en unu loko ... serĉis en alia ... Lia vizaĝo estis malĝoja. Fine li diris per malforta voĉo:

– Mi ne havas monon.

Kio okazis poste? Ĉu vi scias?



## M9 Ekzerco

Ĉu tiuj frazoj estas veraj (+) aŭ malveraj (-)? Korektu la malverajn.

| |
|---|
| Ana kaj Marko longe parolis antaŭ la kafejo. |
| Estis varma tago. |
| En la kafejo ili vidis kukojn. |
| Ni eniru kaj trinku – diris Marko. |
| Mi havas cent dolarojn – diris Ana. |
| La kelnero manĝis multajn kukojn. |
| Marko serĉis la monon. |
| Li ne havas sufiĉan monon. |

## M10 Ekzerco

Aŭskultu kaj plenigu la truojn.

A: Saluton, mi estas ____________. Kiu vi estas?

B: Saluton, mi estas ____________. Ĉu vi vojaĝis ____________?

A: Tre bone.

B: Kiel ____________ vi vojaĝis de Maribor al ni?

A: Tre longe. Nun mi ŝatas manĝi.

B: Ni havos manĝon en restoracio. Ĉu vi ____________ manĝi bananojn?

A: Jes. Kion ni faros poste?

B; Ni iros al ____________ geamikoj dormi en iliaj hejmoj.

A: Ĉe kiu amiko mi dormos?

B: Mi vidos sur la ____________. Ĉe Linda.

A: Ĉu ŝi havas gefratojn?

B: Jes. Ŝi ____________ fraton Leon.

A: Kia li estas kaj kion li faras?

B: Li ____________ gimnaziulo.

A: Bone, ankaŭ mi estas. Ni bone ____________.

B: Bonan apetiton. Nun mi devas iri. Saluton.

A: ____________.

# M11 Dialogo



**A** Saluton, mi estas Ana. Kiu vi estas?
**B** Saluton, mi estas Petro. Ĉu vi vojaĝis bone?
**A** Tre bone.
**B** Kiel longe vi vojaĝis de Maribor al ni?
**A** Tre longe. Nun mi ŝatas manĝi.
**B** Ni havos manĝon en restoracio. Ĉu vi ŝatas manĝi bananojn?
**A** Jes. Kion ni faros poste?
**B** Ni iros al novaj geamikoj dormi en iliaj hejmoj.
**A** Ĉe kiu amiko mi dormos?
**B** Mi vidos sur la papero. Ĉe Linda.
**A** Ĉu ŝi havas gefratojn?
**B** Jes. Ŝi havas fraton Leon.
**A** Kia li estas kaj kion li faras?
**B** Li lernas en gimnazio.
**A** Bone, ankaŭ mi. Ni bone amikos.
**B** Bonan apetiton. Nun mi devas iri. Saluton.
**A** Saluton.

## M12 Hejmtasko

Traduku la Tekston 7 kaj lernu la novajn vortojn parkere.

Skribu mallongan dialogon kun la vortoj, kiujn vi jam scias.

# Bloko 13 (sesioj 25-26)

## Lernoceloj

- ekkoni la uzadon de la prepozicioj per kaj kun
- ekkoni la novan sufikson -EBL-

## Bezonataj instruiloj

- komputilo por ludi sonon

## Pretigado

- Sonoj **6, 7**
- Kopioj de **M6**
- Kopioj de **M13**
- Kopioj de **M14**
- Kopioj de **M15**
- Kopioj de **M16**

## Novaj vortoj

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| kie | = | kie | interese | = | interese |
| interreto | = | interreto | biciklo | = | biciklo |
| leciono | = | leciono | moderna | = | moderna |

## Lernplano

| | |
|---|---|
| 20 min | Disdonu la dialogon **M13**.<br>Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin. Petu unu duopon laŭtlegi la dialogon kaj traduki ĝin linion post linio. Helpu ilin kun tradukado, se necese. Poste petu tiun duopon ludi la dialogon sen traduki ĝin denove. Se estas tempo, vi povas peti aliajn duopojn ludi la dialogon. |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 10 min | Klarigu la novajn gramatikaĵojn. La prepozicioj PER kaj KUN estas en multaj lingvoj unu afero kaj ne estas facile distingataj, kiam ili estas uzataj en malsamaj funkcioj. |
| 5 min | Disdonu la ekzercon **M14**. La lernantoj metu la vortojn en la ĝustan ordon kaj kreu frazojn. |
| 5 min | Disdonu la ekzercon **M15**. La lernantoj traduku la frazojn solaj aŭ en duopoj. |
| 10 min | Paŭzo |
| 20 min | Petu la lernantojn legi mallongan skeĉon el la antaŭaj lecionoj. Kreu grupojn de tri lernantoj. Ili kune legu kaj traduku la Skeĉon **M16**. |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 5 min | Kantu kune la kanton **M6**. |
| | Donu hejmtaskojn |

# Dialogo

| | |
|---|---|
| **Ivo** | Kie vi vidis facilan lingvolecionon? Mi volas lerni rapide. |
| **Maria** | En la lernolibro kiun eldonis Inter-kulturo. |
| **Ivo** | Ĉu estas kompreneblaj demandoj? |
| **Maria** | Ankaŭ respondoj estas kompreneblaj kaj paroleblaj. |
| **Ivo** | Kiel geinstruistoj instruas? |
| **Maria** | Ili instruas sen libroj sed per interretaj lecionoj. |
| **Ivo** | Interese. Modernaj metodoj. Mi ŝatas kaj mi lernos per via metodo. |
| **Maria** | En la kurso oni ankaŭ kantas kaj ĝoje lernas vortojn. |
| **Ivo** | Mi iras enskribi min al la kurso. |

## M14 Ekzerco

Metu la vortojn en la ĝustan ordon kaj faru demandojn.

1 – demandoj / estas / ĉu / kompreneblaj ?

2 – instruas / geinstruistoj / kiel ?

3 – vidis / lecionon / kie / vi / facilan ?

## M15 Tradukekzerco

Mi lernas per lernolibro, li lernas per interreto. Ŝi iras per biciklo kun amikino. Li iras per amikino kun biciklo. Kun kiu vi amikas? Per kio vi muzikas? Kun kiu vi kantas?

## Mi ne volas manĝi

**Patrino** (al infano)
Manĝu!

**Infano** Mi ne volas!

**Patrino** Manĝu! Estu bona! Manĝu!

**Infano** Mi ne volas manĝi. Mi ne volas esti bona.

**Patrino** (al la patro)
Ĉu vi vidas? Li ne volas manĝi. Li ne volas esti bona.

**Patro** (al la patrino)
Jes. Mi vidas. Li diras ke li ne volas manĝi. Li diras ke li ne volas esti bona.

**Patro** (al la infano)
Ĉu vi volas manĝi? Ĉu vi volas esti bona? Vi devas manĝi. Vi devas esti bona.

**Infano** Ne, mi ne volas manĝi. Ne, mi ne volas esti bona. Mi ne devas manĝi. Mi ne devas esti bona. Kiu diras ke mi devas manĝi? Kiu diras ke mi devas esti bona?

**Patrino** Ĉu vi ne povas manĝi?

**Infano** Mi povas. Mi ne volas. Mi povas manĝi. Mi ne volas manĝi. Mi povas esti bona. Mi ne volas esti bona. Mi povas diri, ke mi ne volas manĝi. Mi povas diri ke mi ne volas esti bona.

**Patro** Vi ne povas diri, ke vi ne volas manĝi. Vi devas manĝi!

**Infano** (elprenas libron, lernolibron de Esperanto)
Mi ne devas manĝi. Mi ne havas tempon. Mi lernas Esperanton.

**Patro kaj patrino** (kune)
Li ne havas tempon. Li lernas Esperanton.

## M17 Hejmtasko

Lernu la novajn vortojn parkere. Rigardu denove la vortojn el la lecionoj**1** kaj **2**.

Kreu frazojn per la komputilo. Kreu 5 frazojn ĉiutage; traduku ilin kaj skribu ilin, se ili estas ĝustaj.

# Bloko 14 (sesioj 27-28)

## Lernoceloj

- ekkoni la sufiksojn -EJ- kaj -UL-
- ripeti la sufikson -EBL-

## Bezonataj instruiloj

- komputilo por ludi sonon

## Pretigado

- Sono **8**
- Kopioj de **M18**
- Kopioj de **M19**
- Kopioj de **M20**
- Koloraj vortkartoj **M21**
- Kopioj de **M22**

## Lernplano

| | |
|---|---|
| 20 min | Disdonu la ekzercon **M18**. Petu la lernantojn kompletigi la frazojn, dum vi laŭtlegas la frazon **M19**.<br>Disdonu la dialogon **M19**.<br>Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin. Petu unu duopon laŭtlegi la dialogon kaj traduki ĝin linion post linio. Helpu ilin kun tradukado, se necese. Poste petu tiun duopon ludi la dialogon sen traduki ĝin denove. Se estas tempo, vi povas peti aliajn duopojn ludi la dialogon. |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 5 min | Klarigu la uzon de la sufiksoj -UL- kaj -EJ-. |
| 10 min | Paŭzo |
| 20 min | Disdonu la ekzercon **M20**. Reklarigu la signifon de la sufiksoj -EJ-, -UJ- kaj -EBL-.<br>Disdonu la kartojn **M21**. La lernantoj formu duopojn kaj kompletigu la ekzercon aldonante sufiksojn al la vortoj.<br>Ekzemploj:<br>• -EJ: lernejo, sidejo, parolejo, kantejo, laborejo, kuirejo<br>• -EBL: videbla, komprenebla, portebla, serĉebla, havebla, videbla<br>• -UL: grandulo, malbelulino, malriĉulo, belulino |
| 5 min | Nelingva paŭza ludo |
| 10 min | Disdonu la ekzercon **M22** kaj petu la lernantojn plenumi ĝin. |
| 10 min | Kantu kune kelkajn el la kantoj. |
| | Donu hejmtaskojn |

# M18 Ekzerco

Plenigu la vortojn per unu el la jenaj vortoj: Bone, Hejmo, Jes, portas, tablon, libro, portas, povas, librojn.

Petro: Kion vi ____________?

Ana: Mi portas librojn. Mi ŝatas legi ____________.

Petro: Ĉu vi ____________ doni al mi libron por legi?

Ana: ____________. Kie vi legos ĝin?

Petro: En mia ____________. Tie mi havas grandan ____________, seĝon kaj lampon.

Ana: Unu ____________ ne estas legebla.

Petro: ____________. Ĝin mi ne legos.

# M19 Dialogo



| | |
|---|---|
| **Petro** | Kion vi portas? |
| **Ana** | Mi portas librojn. Mi ŝatas legi librojn. |
| **Petro** | Ĉu vi povas doni al mi libron por legi? |
| **Ana** | Jes. Kie vi legos ĝin? |
| **Petro** | En mia hejmo. Tie mi havas grandan tablon, kaj seĝon. |
| **Ana** | Unu libro ne estas legebla. |
| **Petro** | Bone. Ĝin mi ne legos. |

M20 Ekzerco

Formu vortojn kaj skribu ilin en la ĝustan kolumnon.

| **-EJ-** | **-UL-** | **-EBL-** |
|---|---|---|
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |

| | |
|---|---|
| ej | ul |
| ebl | a |
| o | ino |

| | |
|---|---|
| lern | sid |
| parol | kuir |
| labor | kant |
| vid | malriĉ |

| | |
|---|---|
| port | serĉ |
| hav | vid |
| grand | malbel |
| belul | kompren |

# M22 Ekzerco

Kompletigu la frazojn.

e.g. Marko ne havas sufiĉan monon.

Mi trinkas ________________ ________________.

Ni vidis ________________ ________________.

Lia frato kantos ________________ ________________.

Ana manĝas ________________ ________________.

Lernanto komprenas ________________ ________________.

## M23 Hejmtasko

Lernu ĉiujn vortojn el la leciono **3** parkere.

Rerigardu la vortojn el la lecionoj **1, 2** kaj **3**.

Skribu 5 frazojn kun la finaĵoj -ej-, -uj- kaj -ebl-.